

Charles Ecabert : *Patro Gregoro Girard*  
Claude Gacond, 227-a radioprelego, 1968.02.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Dum la kvin pasintaj elsendoj vi aŭdis prelegojn verkitajn de Charles Ecabert pri la grava svisa edukisto Henriko Pestalozzi.

Cl.- Hodiaŭ ni komencas la legadon de alia tekstaro pri alia svisa edukisto malpli konata. Charles Ecabert redaktis tiujn tekstojn antaŭ kvin jaroj ĵus antaŭ sia morto.

A.- « Eksterordinare kaj amplekse influhava estis Svislando sur la kampo de la edukado fine de la 18-a jarcento. Flanke de Rousseau ni jam trovis Pestalozzi ; al ambaŭ ni dediĉis serion da prelegetoj. Hodiaŭ ni komencos priskribi trian alian grandan figuron de edukisto : Gregoro Girard, 1765-1850, monaĥo ŝnurfranciskana aŭ kordeliero. Tiu branĉo de la franciskana ordeno tiel nomiĝas, ĉar sur la nigra froko ili portas blankan ŝnuron aŭ kordonon.

Cl.- Naskiĝis la 17-an de decembro 1765 en Friburgo, Svislando, kvina el 15 infanoj, ricevante en la bapto, laŭ la tiama kutimo tutan sinsekvon de nomoj : Johano-Baptisto-Melkioro-Gasparo-Baltazaro.

A.- Verŝajne lia familio multe ŝatis la tri reĝojn.

Cl.- Nu, oni nomas lin per ankoraŭ alia nomo, per tiu, kiun li ricevis en la religia ordeno : Gregoro.

A.- La familio Girard devenis el Savojo. La patro estis bonhava drapisto, al kiu la patrino montris egan respekton, lin ĉiam titolante : sinjoro.

Cl.- La ĉefajn eventojn de sia vivo Patro Girard mem raportis en manuskripto aŭtografa, sub la titolo *Kelkaj memorindaĵoj el mia vivo*. Tiu aŭtografio entenanta 6 partojn estis redaktita ekde 1826. Bedaŭrinde la kvara, kiu nin plej interesus el la eduka vidpunkto, malaperis. Eble ĝi pereis dum la transporto de la paperoj en korboj el la ĉambro de la mortinta Patro al la domo de lia biografo Daguet.

A.- Kiel Pestalozzi estis dum sia infaneco stampita de la personeco de sia patrino kaj per la atmosfero de la **Wohnstube**, tiu restada ĉambro, Girard multe ricevis de la patrino boneco, tenereco, saĝeco kaj sana vivfilozofio.

Cl.- Iam malgrandanima gubernisto, pri protestanta kampulino, kiu ĉiusemajne portis al la familio legomojn kaj fruktojn, diris al la juna Girard :

A.- « *Ŝi estos damnita, neapartenante al la katolika religio, ekster kiu estas nenia saviĝo.* »

Cl.- La infano dronis en larmoj ĝis panjo lin konsolis dirante :

A.- « *Via gubernisto estas nura azeno. Bondio ne damnas bonulojn.* »

Cl.- Aldonas Gregoro :

A.- « *Mia patrino estis parolinta, ŝi estis parolinta laŭ mia koro kaj mi havis du aŭtoritatojn, kiuj estus venkontaj ĉiajn doktorojn en la universo. Mi dirus al ili fiere : Vi estas nur azenoj, Panjo ĝin diris.* »

Cl.- Parolo de patrino tenere amata estas por infano nerefutebla aŭtoritato. Ĝi iĝas tute dia, kiam, elirinta el la patrino koro, ĝi estas ricevita de la infana koro.

A.- « *Por mi, mi ĉiam tenis la parolon, kiu min konsolis kaj nomis ĝin poste teologio de mia patrino.* »

Cl.- Patro Girard, kiel ni vidos pli poste, pedagogie famiĝis inter alie pro la reciproka instruado, aplikante sistemon de Lancaster, kiun li fakte jam delonge konis, praktikinte ĝin sub la okuloj de sia patrino.

A.- « *Mi scipovis legi, skribis malbone kaj malbele, havis kelkajn kalkulajn elementojn. Mia patrino domaĝis nian instruadon kaj kiam libertempis la guvernisto, mi estis ŝarĝita instrui kelkajn el miaj gefratoj.* »

Cl.- La juna instruisto punas, kiel li vidis fari la guverniston, frapante la lernantojn per liniilo. Plendas la punitoj, intervenas kaj kontrolas la patrino.

A.- « *Panjo ŝpinis aŭ trikis tutapude de la eta lernantaro, havante ĉe siaj piedoj lulilon, apud ŝi la lernantoj pli atentis, la instruisto pli deteniĝis, ĉiuj pli bone troviĝis.* »

Cl.- Ekde la junecjaroj Girard konsciis pri la gravaj difektoj de la instrumentadoj.

A.- « *La instruo, kiun oni donis al mi, havis nenian allogon, nek funde, nek forme. Legi aferojn, kiujn mi ne komprenis, parkere lerni kaj reciti, poste fari kelke da rigidaj kaj dormigaj kalkuloj, adicioj, subtrahoj, ktp... pri ciferoj sen iu ajn aplikado : jen la tuta instruado. En ĉio tio nenio estis kapabla paroli al la menso kaj al la koro, nenio kapabla kontentigi la kunnaskitan scivolemon de la infano, - unuvorte, nenio por lin instrui.* »

Cl.- Gregoro Girard aldonas :

A.- « *Aliflanke la guvernisto havis nur rutinojn kunportitajn el la vilaĝoj, sen ia ombro de metodo. La kuiristino almenaŭ aŭ la ĉambristino faris al mi rakontojn, kiuj min interesis kaj mi ege atentis.* »

Cl.- Kontraŭ tiuj tetaĵoj li serĉis kompenson en siaj ludoj, desegnis, pentris, faris etajn konstruaĵojn kaj figurojn el kartono, vakso, ligno, kaj eĉ vintre, neĝo. Li deklaras :

A.- « *Mi aŭdacas diri, ke dank'al la kombinoj postulitaj de niaj etaj faritaĵoj, nia intelekto multe pli disvolviĝis, ol per ĉiuj oficaj lecionoj ricevitaj.* »

Cl.- Rilate la instruon disdonitan en la kolegio, kien li eniris dekjara, li notas :

A.- « *La lernado estis malbone komprenita. Mi perdis tie multe da tempo. En la retorika klaso mi estis sukcesinta paroli kaj skribi la latinan iom facile. Mi sciis la akordregulojn, sed finfine tio estis nur franclingvo sub latinaj vortoj. Pri tio ni ne kulpis. La instruo radike difektis en tio, ke ĝi volis inventigi al la lernanto la Roman lingvon.* »

Cl.- Sekve Girard akre riproĉas la rutinemajn respondeculojn pro malzorgemo :

A.- « *Rutino dum jaroj konfirmata estis sankta kesto : neniu aŭdacis ĝin tuŝi. Pro sakrilegio estus plendintaj tiuj kutimemuloj, kiuj nomas Herezo ĉion, kion ili nek faris, nek scipovis. Nia Kapitolo ĉiam havis siajn anserojn.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-